

La 26an de aŭgusto 2016

Du nukleaj centraloj en Fukui

En la gubernio Fukui troviĝas 15 nukleaj reaktoroj. Post la vizito de la Muzeo en Maizuru ni vizitis du nukleajn centralojn, Takahama kaj Ooi. Sube estas mapo de tiuj centraloj.

15 nukleaj reaktoroj en Fukui



La nuklea centralo Takahama

Unue ni vizitis la nuklean centralon Takahama. En ĝi troviĝas jenaj 4 reaktoroj. En la interreta paĝo de Takahama la kompanio klarigas jene:

| Numero | Speco de reaktoro | Povo | Jaro de ekfunkcio |
|--------|---------------------------|------------|-------------------|
| 1 | | 826 mil kW | Novembro 1974 |
| 2 | Premakvaj Reaktoroj (PWR) | 826 mil kW | Novembro 1975 |
| 3 | | 870 mil kW | Januaro 1985 |
| 4 | | 870 mil kW | Junio 1985 |

Takahama produktas 20% de la tuta elektro de la Elektra Kompanio Kansai. Uzante varmigitan akvon en la reaktoro, ni prove vartas marorelojn kaj marhelikojn.

Mi estas surprizita pro la vartado de konkuloj. Mi jam aŭdis, ke en la maro proksime de nukleaj centraloj estas bona fiŝkaptejo pro varmigita akvo. En la maro ĉi tie troviĝis flosantaj platoj por fiŝkaptistoj. Nukleaj centraloj estas kulpaj pri media varmigo, enflugante kvantegon da varma akvo en la maron, sed la kompanio tute ne kritikas sin pro tio. Male ĝi fieras pro tio, ke dank' al varmigita akvo ĝi kontribuas al bona fiŝado en la maro.

En la foto en la sekva paĝo vidiĝas 4 reaktoroj: meze vidiĝas du rondtegmentaj reaktoroj. Ili estas reaktoroj de

la numeroj 3 kaj 4. Kaj la dekstraj tubaj reaktoroj estas tiuj de la numeroj 1 kaj 2. Konstrukostoj estis:

Reaktoro 1: 65,6 miliardoj da enoj (656 milionoj da eŭroj),
Reaktoro 2: 60,4 miliardoj da enoj (604 milionoj da eŭroj),
Reaktoro 3: 280,3 miliardoj da enoj (2,803 miliardoj da eŭroj),
Reaktoro 4: 209,6 miliardoj da enoj (2,096 miliardoj da eŭroj).

La produktopovo de tiuj 4 reaktoroj ne diferencas multe. Kial la konstrukosto tiom diferencis? En 1973 kaj 1974 ili multe inflaciis. Ĉu la salto de la kosto estis kaŭzita de tiutempa inflacio?



La reaktoroj de la numeroj 1 kaj 2 estas jam pli ol 40-jaraj, do laŭ la regulo ili devus esti forĵetitaj, sed la Nuklea Reguligada Aŭtoritato aprobis funkciigon por la venontaj 20 jaroj kiel esceptojn, kaj la kompanio planas funkciigi ilin post oktobro 2019. La unuan fojon la Aŭtoritato aprobis refunkciigon de “kadukaj” reaktoroj.

Pri la reaktoroj n-roj 3 kaj 4, la juĝejo de Oocu en la gubernio Ŝiga malpermesis la funkciadon, tial la kompanio komencis elpreni 157 nukleajn brulaĵarojn el la reaktoro n-ro 4 la 17an de aŭgusto kaj elprenos brulaĵarojn el la reaktoro n-ro 3 ekde la 5a de septembro.

La nuklea centralo Ooi

Poste ni celis la nuklean centralon de Ooi. En la urbo Ooi troviĝas grandaj, luksaj konstruaĵoj donacitaj aŭ subvenciitaj de la elektra kompanio Kansai.

En la sporta parko (suba foto) troviĝas du sportejoj, multcela sportejo, naĝejo, teatro, muzeo, gimnastikejo, tenisejoj kaj basbalejo. Sur la muro de ĉiuj instalaĵoj estas



plato, sur kiu estas skribite “subvenciita el la mono por progresigi urbojn, en kiu staras nuklea centralo”.

En alia loko estas granda muzeo, en kiu oni povas ĝui spektaklojn pri la estonta vivo. Komprenebla estas salono por klarigi avantaĝon de nuklee produktita elektro. Tiuj sportejoj kaj la muzeo estis konstruitaj por subaĉeti loĝantojn. Per mono la kompanio silentigis malkontenton. Ni parolis kun gardisto tie, kaj li diris kun kontenta mieno pro tiuj luksaj konstruaĵoj: “La elektra kompanio Kansai havas monon senlime”.



De la urbeto Ooi ni trapasis la ponton kaj eniris en la malgrandan duoninsulon kaj atingis la pordon de la nuklea centralo Ooi. Gardistoj alkuris nin kaj svingis manojn, dirante, ke ni ne fotu. Tie estas publika vojo, do ni rajtas foti. Tamen ne troviĝis

fotindaĵoj. Unu el la gardistoj diris, ke oni konstruis la reaktorojn en kaŝita loko. La maldekstra foto, kiun mi fotis, montras la tunelon de la centralo, kiu kondukas al la

reaktoroj. La dekstra foto, kiun mi prenis el interreta paĝo, montras la kaŝitajn reaktorojn.



Pri tiuj reaktoroj la kompanio klarigas jene en sia retejo:

| Numero | Speco de reaktoro | Povo | Jaro de ekfunkcio |
|--------|---------------------------|--------------|-------------------|
| 1 | | 117,5 mil kW | Marto 1979 |
| 2 | Premakvaj Reaktoroj (PWR) | 117,5 mil kW | Decembro 1979 |
| 3 | | 118 mil kW | Decembro 1991 |
| 4 | | 118 mil kW | Decembro 1991 |

La nuklea centralo Ooi povas produkti 471 mil kW kaj ĝi estas la plej granda centralo de la kompanio. Ĝi situas en la bela nacia parko Ŭakasa kaj ĉirkaŭata de impona naturo. Ni aktive agadas por protekti medion por ke ni ne difektu belajn maron kaj verdaĵojn kaj samtempe klopodas rekreskigi perditajn arbarojn.

La konstrukosto estas

Reaktoro 1: 1843 miliardoj da enoj (18,43 miliardoj da eŭroj)

Reaktoro 2: 1225 miliardoj da enoj (12,25 miliardoj da eŭroj)

Reaktoro 3: 4582 miliardoj da enoj (45,82 miliardoj da eŭroj)

Reaktoro 4: 2535 miliardoj da enoj (18,43 miliardoj da eŭroj)

Por ŝpari monon, oni metis du reaktorojn en unu reaktordomon. Ĉu ne estas danĝero, ke se unu serioze difektiĝos, tio damaĝos la alian? Troviĝas aliaj du klaraj danĝeroj:

1. Troviĝas faŭlto 3 kilometrojn for en la golfo Ŭakasa.
2. La centralo situas en la duoninsulo, do kiam okazos granda cunamo, ĝi senhelpe izoliĝos.

Nun ĉiuj 4 reaktoroj ne funkcias pro ekzameno.

Ĉiuj japanaj nukleaj centraloj situas laŭ la maro kaj en izolita loko, do estas malfacile por ordinaraj homoj viziti ilin. Ĉi-foje mia amiko veturigis nin per prunteprenita aŭtomobilo, do ni povis viziti du centralojn. Ili staras en la nacia parko, kie homoj povus ĝui naturan belecon kaj ripozi. En tiu loko la registaro permesis konstruadon de danĝeraj nukleaj centraloj. Tio estas nekredebla afero. Ja troviĝas belaj turismaj plaĝoj kaj ripozejoj ĉirkaŭ tiuj centraloj, sed ĉu homoj povas amuzi sin en tiuj lokoj? Ĉu la loĝantoj de Ooi havas feliĉan vivon kun multaj donacoj de la elektra kompanio? Nukleaj centraloj donas pli da